WIKIPEDIA

Komora lingvo

La **komora lingvo** (*Shikomor* [Ŝikomor]; alternativa nomo *Shimasiwa* [Ŝimasiŭa] por "lingvo de la insuloj") estas krom la araba kaj franca lingvoj unu el la tri oficialaj lingvoj de la Komoroj kaj la gepatra lingvo de preskaŭ ĉiuj el la 800.000 loĝantoj de la arkipelago (inkluzive de Majoto).

La komora ekde jarcentoj skribiĝas per la araba alfabeto. Dum la lastaj jardekoj ekzistas streboj interkonsenti pri unueca transskribo al la latina alfabeto.

La komora proksime parencas al la svahila lingvo kaj kompare al tiu estas multe pli forte influita de la araba lingvo. Ĉar la Komoroj tra multaj jarcentoj estis ripete vizitataj de maristoj el multaj nacioj, krome ekzistas multaj vortoj prenitaj el la persa, portugala, malagasa, angla kaj franca lingvoj.

Ĉiu insulo havas sian propran dialekton:

- Granda Komoro - *Ŝingadzija* (*Shingadzija*)
- Anjuano - *Ŝindzuani* (*Shindzuani*)
- Mohéli - *Ŝimŭali* (*Shimwali*)
- Majoto - la maorea lingvo aŭ *Ŝimaore* (*Shimaore*)

La komora ankaŭ estas la lingvo de la nacia himno de la Komoroj - *Udzima wa ya Masiwa*.

Komora lingvo	
shikomor	
Parolata en	Komoroj, Majoto, Madagaskaro
Denaskaj parolantoj	preskaŭ 800.000 (Komoroj kaj Majoto)
Skribo	araba alfabeto
Lingvistika klasifiko	
▪ niĝerkonga lingvaro	
Atlantikokonga	
Voltakonga	
Benue-konga	
Bantua lingvaro	
Svahilaj lingvoj	
komora	
Oficiala statuso	
Oficiala lingvo en	la Komoroj
Lingvaj kodoj	
Lingvaj kodoj	
ISO 639-2	bnt
SIL	swb (http://www.sil.org/iso639-3/documentation.asp?id=swb) (Ŝimaore), wlc (http://www.sil.org/iso639-3/documentation.asp?id=wlc) (Ŝimŭali), wni (http://www.sil.org/iso639-3/documentation.asp?id=wni) (Ŝindzuani), zdj (http://www.sil.org/iso639-3/documentation.asp?id=zdj) (Ŝingazidja)
Glottolog	como1260
Angla nomo	Comorian
Franca nomo	comorien

Elŝutita el "https://eo.wikipedia.org/w/index.php?title=Komora_lingvo&oldid=5793397"

Ĉi tiu paĝo estis lastafoje redaktita je 14:32, 11 nov. 2015.

La teksto disponeblas laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite-Samkondiĉe 3.0 Neadaptita; eble aldonaj kondiĉoj aplikeblas. Vidu la uzkondiĉojn por detaloj.